

& Printempa kanto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 406 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Janko Král'. El slovaka tradukis Pavel Rosa (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per melodio kaj rekantaĵo de Petro sinjor' kaj Elinborg'.>

(#Melodio:

<1,6:29>

(/LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo; doTi doTi LaSo

(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a)

)×14)+

(&Strofoj:

,& Parto unua:

'1 Kantis kanton fruprintempan vigla kukoleto, ; vokis mondon dormetantan al nova impeto.

(×: **Nun emas mi e2n dancon jam iri ; dum rozoj, lilioj kreskadas tre.**)

'2 Voĉo de la libereco vekas tutan mondon - ; ĉu ni knaboj elsub Tatroj ne donu respondon?

'3 Ĉiujn barojn kaj malhelpojn rompas fort' mistera ; kaj nin feblajn ĉu priridu montaro aŭstera?

'4 Ekmoviĝis Subtatranoj kaj parencaj gentoj, ; super Slavoj matenruĝas de libero sentoj.

'5 Ne ekzistas nom' pli bela, ol la nom' - libero, ; nomon tiun ne plu baros eĉ mem la infero!

'6 Niaj fratoj are mortis pro la sankta nomo - ; sed el tombo releviĝas jam libera homo.

,& Parto dua:

'7 Libereco, bela nomo, mondo sen vi vivas! ; Fratoj karaj, ĉie fiaj murdistoj aktivas:

'8 ili ĉiuj diversflanke ege nin strangolas ; kaj slovakon familion neniigi volas.

,& Parto tria:

'9 Venas ŝtormo de danubo, nuboj tre malhelaj, ; tristaj vortoj alvenadas pri Slavoj ribelaj:

'10 sudaj stepoj tristan eĥon al ni nun konfesis - ; Dio kara, ĉu entute vi nin jam forgesis?

'11 Unu trompas, dua murdas - inferanoj ĉiaj, ; kaj la tria primokadas, ke ni estas fiaj.

,& Parto kvara:

'12 Kantu kanton fruprintempan vigla kukoleto, ; voku ĉiujn slavajn fortojn al nova impeto!

'13 Kaj vi, fratos niaj karaj, monde dissemataj, ; se vi eĉ nun ne moviĝos, estu malbenitaj!

'14 Ligu kune fratajn manojn al granda impeto - ; novan kanton kantos al ni nia kukoleto!